Kiel verki per facila lingvaĵo por KONTAKTO ?

Kiam vi verkas por komencantoj, eble vi pensas: “Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?” Provu pensi anstataŭe: **“Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?”**

Eble vi trovos dum la verkado, ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Ankaŭ la redaktoro povas **pli facile simpligi** vian interesan artikolon, ol aldoni intereson al facillingva, sed banala artikolo. Se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi la lingvaĵon, tamen sendu vian artikolon!

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

Facileco: La facillingvaj artikoloj de *KONTAKTO* aperas en du niveloj:

Tre facila: Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de ***Aldone.*** Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klarigi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.

Facila: Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. Aliajn necesas klarigi.

Longeco: Verku ne tro longan artikolon! Prefere ĝi ne enhavu pli ol 800 vortojn. Se vi opinias, ke tio ne sufiĉas, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde.

Stilo: Uzu simplajn frazstrukturojn kun kutima vortordo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verban substantivon, se eblas uzi verbon anstataŭe.

Gramatiko: Je la nivelo ***Facila*** jam estas uzata la tuta baza gramatiko. Je la nivelo ***Tre Facila*** oni nĵe uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo -anto, necesa en vortoj kiel leganto, prezidanto).

Nomoj: Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne Esperantigu propran nomon, sed uzu Esperantan nomon nur se ĝi jam ekzistas! Prefere uzu nacilingvan (latinalfabetan) formon, kaj aldonu inter krampoj la prononcon.

Aldone uzeblas ĉiuj oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag– kaj monatnomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj kaj la plej konataj mallongigoj.

Abon- **aĉet- adres- aer-** afabl- **aferag-** agrabl- **aĝ-** ajn **akcept-** akr- aktiv- **akv- al ali-** almenaŭ **alt- am-** amas- ambaŭ **amik-** amuz- angul- anim- **ankaŭ ankoraŭ** anonc- **anstataŭ antaŭ** aparat- **apart-** aparten- apenaŭ **aper- apud** arang- arb- **art- artikol- asoci-** aspekt- atak- atend- **atent-** ating- **aŭ aŭd- aŭskult- aŭtobus- aŭt(omobil)- aŭtun-** av- azen-

Baldaŭ ban- bar- bat- batal- baz- bedaŭr- **bel- best- bezon-** bibliotek- bicikl- bier- **bild-** biblet- **bird-** blank- blov- blu- bol- **bon-** bord- botel- bov- brak- **bril-** bros- bru- brul- brun- brust- buŝ- buter- buton-

Cel- cerb- centr- **cert-** ceter- cigared- cirkl-

Ĉambr- ĉapel- **ĉar ĉe ĉef-** ĉemiz- ĉes- ĉeval- **ĉi ĉiel- ĉirkaŭ ĉu**

Da danc- danĝer- **dank- daŭr- de decid-** defend- **dekstr- demand-** dens- dent- **desegn-** detal- **dev- dezir-** di- diferenc- difin- **dik- dir- direkt-** disk- diskut- **divers-** divid- **do doktor- dolĉ-** dolor- **dom-** domaĝ- don- donac- **dorm-** dors- drat- dub- **dum** dung-

Eben- **eĉ eduk- edz-** efektiv- efik- egal- ekonomi- ekskurs- ekspozici- **ekster** ekzamen- **ekzempl-** ekzerc- **ekzist- el elekt-** elektr- emoci- **en** energi- erar- **esper-** esplor- esprim- **est-** estim- eventual- evolu-

Facil- faden- fajr- **fak- fakt-** faktur- **fal-** fam- **familiar- far-** fart- **feliĉ- fenestr-** fer- feri- **ferm- fest-** fiks- **fil- filmfin-** fingr- **fiŝ-** flag- **flank-** flav- **flor-** flu- **flug- foj-** foli- fond- font- **for forges-** fork- **form- fort-** fos- **fot- frap- frat-** fraŭl- fremd- frenez- freŝ- frost- **fru-** frukt- fulm- fum- **funkci-** fuŝ-

Gaj- gajn- gas- gast- **gazet-** glaci- **glas-** glit- **grand-** gras- gratul- **grav-** gren- griz- **grup-** gust- gvid-

Ĝarden- ĝen- **ĝeneral-** ĝentil- **ĝis** ĝoj- ĝu- **ĝust-**

ha halt- har- haŭt- **hav-** haven- **hejm-** hel- **help-** herb- **hieraŭ histori-** ho **hodiaŭ hom- hor-** horloĝ- hotel- hund-

Ide- ideal- imag- imit- industri- **infan- inform-** insekt- insign- **instru-** insul- inteligent- intenc- **inter interes-** intern- **invit- ir-**

Ja **jam jar- je jen jes jug- jun-** jup- just-

Ĵet- jus

kadr- kaf- **kaj** kajer- kalendar- **kalkul- kamp- kant-** kap- kapabl- **kapt- kar-** karb- kart- kased- kaŝ- kat- **kaŭz-** kaz- **ke kelk-** kilogram- kilometr- kis- **klar- klas-** klin- klopod- **klub- knab-** kol- **kolekt-** koler- **kolor-** komb- **komenc- komerc-** komfort- komisi- komitat- kompar- kompat- **kompren-** komput- **komun-** komunik- **kon-** koncern- kondiĉ- konduk- konfes- **kongres-** konkret- **konsent-** konserv- konsider- **konsil-** konsist- konstant- **konstru- kontakt- kontent- kontraŭ** kontrol- konven- konvink- kopi- kor- korb- korespond- korp- kort- **kost-** kostum- kovert- kovr- krajon- kre- **kred- kresk-** kri- **krom** kruel- krur- kudr- **kuir-** kuk- kuler- kulp- **kultur- kun** kupon- kur- kurac- kurag- **kurs- kuŝ-** kutim- kuz- kvadrat- kvalit- kvankam kvant- kvazaŭ

La **labor-** lac- **lag- lakt- land-** lang- **larĝ- las- last-** laŭ **lav- lecion- leg-** legom- leĝ- **lern-** lert- **leter- lev- liber- libr- lig-** lign- lim- **lingv-** lini- lip- list- lit- liter- **literatur- log- lok- long- lud-** lum- lun-

Man- **mang- manier- mank-** mantel- **mar- mark-** marŝ- mastr- **maŝin- maten-** material- mebl- medi- **mem membr- memor-** mend- mens- merit- **met-** metal- **metod-** metr- **mez-** mezur- miks- **milit- minus- minut- mir-** modern- mok- mol- moment- **mon- monat- mond- mont- montr- morgaŭ mort- mov- mult-** mur- muŝ- muze- **muzik-**

Naci- nag- **nask- natur-** naz- **ne** nebul- **neces-** neĝ- nek nep- nepr- neŭtral- nev- nigr- nivel- **nokt- nom-** nombr- nord- normal- not- **nov-** nu nub- **numer- nun nur**

Obe- objekt- odor- **ofic- oft- okaz-** okcident- okul- **okup- ol** ole- onkl- **opini-** or- ord- **ordinar-** ordon- orel- **organiz-** orient- original- ost- ov-

Pac- **pag- paĝ-** pak- palp- **pan-** pantalon- **paper-** par- **pardon-** park- **parol- part-** pas- paŝ- **patr- pec-** pen- **pend- pens-** pentr- **per perd-** perfekt- period- **permes- person- pet-** pez- **pied-** pik- pilk- **plaĉ-** plafon- plan- plank- plant- plast- **plej plen-** plend- **plezur- pli** plor- **plu** plum- **plur-** plus pluv- po **poem-** poent- poezi- polic- politik- pont- **popol-** popular- **por pord- port- post** postul- poŝ- **poŝt-** pot- **pov-** praktik- prav- **precip-** preciz- **prefer-** preĝ- preleg- prem- premi- **pren- prepar- pres- preskaŭ pret-** preter prez- **prezent- prezid- pri** princip- **printemp- pro problem- produkt-** profund- program- progres- projekt- **proksim-** promen- promes- propon- **propr- prov-** prunt- **publik-** pun- punkt- pup- **pur-** puŝ-

Rad- **radi- rajt- rakont-** rand- rang- **rapid- raport- redakt-** reg- **region- regul-** reĝ- reklam- **rekomend-** rekt- religi- **renkont- respond- rest- revu-** rezult- **ricev- riĉ- rid- rigard- rilat- rimark-** rimed- **ripet-** ripoz- **river-** riz- rob- roman- **romp-** rond- roz- rubrik- ruĝ- rul-

Saĝ- sak- sal- **salon-** salt- **salut- sam- san-** sang- sankt- sat- sav- **sci- scienc- se sed seĝ-** sek- sekretari- seks- **sekv- semajn- sen** senc- **send- sent- serĉ-** seri- serioz- **serv-** sezon- **sid-** sign- **signif-** silent- **simil- simpl- sinjor-** sistem- **situaci- skatol- skrib-** soci- soif- **sol-** soldat- solv- **somer- son-** spec- **special-** spegul- **spert-** spez- spic- spir- spirit- **sport- stacist- star-** stat- stel- strang- **strat-** streĉ- **stud-** stult- **sub** subit- sud- sufer- **sufiĉ- sukces-** suker- sum- **sun- super** supoz- **suprsur**

Ŝaf- **ŝajn-** ŝanc- **ŝang- ŝat-** ŝerc- **ŝip-** ŝir- ŝlos- ŝnur- ŝrank- **ŝtat-** ŝtel- ŝtof- ŝton- ŝtrump- ŝtup- ŝu-

Tabl- tabul- **tag- tamen** tas- task- taŭg- te- **teatr-** tegment- tekst- **telefon-** teler- **televid- tem- tempten-** teori- **ter-** terur- **tim-** tir- tond- **tra** tradici- **traduk-** traf- trakt- **tranĉ-** trankvil- **trans tre trink- tro trov-** tru- **tuj** tuk- turism- turist- turn- tuŝ- **tut-**

Universal- **universi- tat- urb- util- uz-**

Vagon- valid- **valor- varm-** vast- vek- **ven- vend-** venk- vent- **ver-** verd- **verk- vesper- vest-** veter- **vetur- viand-** vic- **vid-** vigl- **vilaĝ-** vin- **vintr- vir-** viŝ- vitr- **viv-** vizaĝ- **vizit-** voĉ- **voj- vojaĝ-** vok- **vol-** volv- **vort-** vost-

Zorg-

Pri ajnaj demandoj kontaktu la redakcion!

KONTAKTO 2006 ©